



AMERIKA



E



FEB., 1922

OFFICIAL ORGAN

of
THE ESPERANTO ASSOCIATION
of
NORTH AMERICA

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of
The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

Group Charter—\$1.00.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall.

Esperanto Association of California, Inc., meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec'y, E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thomson School, XIIth and L Sts., N. W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ciumonate. 19

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 Seventh Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P. M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

HEBON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun ĵaŭdon 8 P. M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimancon 10 A. M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P. M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppeler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the fourth Sunday of each month 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Av.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimancon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kany College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Headquarters 133 N. 13th St. Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P. M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare. *

Single Number 10 Cents.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29.

February, 1922

No. 4. a

A WORLD TONGUE A CRYING NEED

“Conferences between Nations Demonstrate This—Esperanto or Mediaeval Latin”

Absolutely without advance notice came to us January 23rd the encouraging word that Colonel House declares there must be an international language for use in diplomacy and commerce. This Public Ledger copyright interview from the quiet but none the less weighty member of the American Peace Delegation to Versailles, indicates that the foremost men of America are waking up to actualities. The interview states:

“There are few things more necessary to a better understanding between nations than a universal language to be used in commerce and diplomacy.....

“Every one familiar with that [Versailles] Conference knows how much Orlando, the Italian prime minister, was handicapped because of his inability to communicate with his English and American colleagues except thru an interpreter.

“At Washington it is the French who have suffered. There was no one among the heads of their delegation who could speak English except the genial and scholarly Jusserand. What they lost in prestige because of this is a matter for speculation, but that it was great no one at the conference will deny.

“....these two conferences have been successful, so far as the machinery of language is concerned, by chance.”

Not only international conferences, he goes on to tell us, but also commerce, science, and literature, and, in fact, the peoples of the world need the common tongue.

We could almost imagine that here was one of our own propagandists talking, but no, it was one of the great movers of the world, with expert knowledge whereof he spoke, coming unheralded into our ranks. Is it now to be recognized, what we have so long proclaimed, that the harmony of governments must be based upon the harmony of the peoples, and the harmony of the peoples upon a common spiritual culture, a common body of ideas and purposes, which **only a common tongue** can transmit and everywhere and continuously maintain?

Of course some of the newspaper editors got mixed up over the meaning of "universal"; thought this meant to do away with English, newspaper English. A Chicago Daily News editorial for January 27 is so apposite that we commend it to their attention:

"Not everybody realizes how little is demanded by the advocates of a universal language. They have no thought of superseding national tongues. Their idea is to supply a convenience, like travellers' checks. For the ordinary traveler a very little Latin or Esperanto would suffice. The stranger could order taxis, inquire directions and order meals or drinks, with only 200 words or so from the language of Erasmus or Zamenhof.

"For international conferences of scholars and professional men the trick would be still simpler, since these fraternities already have common linguistic bases. Every little science has a lingo of its own. The universal lingo need supply only a set of links to tie the technical terms together. A congress of psychanalysts, talking Freudian to begin with, would need only a few verbs and prepositions to hook up their phobias and manias. Socialists talking Marxian, league of nationites talking Wilsonian, financiers, doctors, dentists, and other professional men all have the same initial advantage.

"The scientific technologies are already world languages in the rough. A small measure of world language to serve as mortar for these scientific bricks seems a simple and practical proposal."

The world, says Colonel House, "has a choice between Esperanto and Mediaeval Latin."

* * * * *

But what of the alternative: Esperanto or Mediaeval Latin? **What is mediaeval Latin?** Dr. Zamenhof's boyhood dream was at first of a world talking Latin, and whatever was of value in that language and consistent with logic and law and modern needs will be found in the **modern Latin** [=Esperanto]. See Verax, Vortaro.

We shall have to admit our incompetence as to mediaeval Latin; we studied only six years at the ancient variety, and—well, as to that kind, we would prefer some later intermediary speech: say French, or Arabic, or even Chinook jargon. We understand that in the Middle Ages people got hopeless of learning Latin grammatically, so wrote it

'most any old way, what few wrote it at all; but that is not, perhaps, what is referred to. Probably what is meant is a use of the entire Latin lexicon [!] but without inflection; the use of the ablative or root only, with or without prepositions, etc., to indicate changes in time, case, and the like. Any Latin teachers who wish to introduce this kind of Latin instead of the classical may be assured of the sympathy of their pupils. Half a loaf is better than none.

"Armi e viri mi cant, qui tanta insomnia bello....."*

It is admissible that for the scholar or scientist who already possesses a good fund of school Latin, the mediaeval idea is plausible; it is a half-way step to modern times; the main point of distinction between it and Esperanto lies in the fact that Mediaeval Latin is a theory of how to make it easy for the scholar and user of technical terms, and leaves it difficult or impossible for the common people to acquire the common element of everyday speech. It is, therefore, rather a confession of the practical impossibility for the learned of classical Latin—itself a discordant confluence of elements Etruscan, Italic, and Greek, probably never used for natural human intercourse even by the Latins themselves—than even in theory a serious competitor of Esperanto.

Ancient Latin was so difficult that its own people abandoned it, mediaeval Latin was so difficult that the lay world definitely threw it overboard, and Esperanto is so easy that the many will and can and are learning it, while Latin of any sort is but a ghost of the drear past to which there is—thanks' be!—no return. Forward, not back! "De world do move."

*This is merely our guess at how Med. Latin would look; non-Latinists may freely translate, perhaps, "Ah, I am weary, I can't quit such a tantalizing pipe dream."

LA LEIPZIGA FOIRO

Dr. Dietterle, direktoro de la Saksa Esperanto-Instituto.

Dufoje en ĉiu jaro, printempe kaj aŭtune en Leipzig okazas la Specimena Foiro, granda internacia aranĝo, kiun vizitas aĉetantoj el ĉiuj landoj; ili provizas sin ĉi tie por la sekanta duonjaro je komercaj, kiuj en neniu loko de la mondo estas prezentataj al ili samkvante kaj samdiverse. La Leipziga Foiro ne dum mallonga tempo fariĝis tia, kia ĝi estas hodiaŭ. Ekonomia institucio, kiel ĝi, kiu evoluis ne forigebla perilo por la internacia komerco kaj ties komercajinterŝanĝo, kiu konstante alvenigas centmilojn da vizitantoj el la en- kaj eksterlando: ĝi bezonis, por atingi tion, longan tempon, kiu samtempe donis al ĝi maturecon kaj firmecon. La Leipziga Foiro historie evoluis dum jarcentoj, kaj ankaŭ depost la tempo, kiam el komercajvendejo ĝi fariĝis specimenekspozejo, jam pasis kelkaj jardekoj. Sed la jus mencita transformiĝo estis la komenco de ĝia moderna evoluo, kaj la Leipziga Foiro poste fariĝis unu el la plej gravaj institucioj, ne nur en la Germana, sed ankaŭ en la eksterlandaj komercinterrilatoj.

La esenco de la Leipziga Foiro estas jeno: Komence de marto kaj fine de aŭgusto en ĉiu jaro la fabrikistoj kaj pograndvendistoj de preskaŭ ĉiuj industriaĵ branĉoj ekspozas dum unu semajno speci-menojn de siaj fabrikajoj; kaj la aĉetistoj de la grandaj magazenoj, de la plej gravaj pomalgrandaj vendejoj kaj de la plej eminentaj aĉetunuiĝoj venas en la sama semajno el la en- kaj eksterlando Leipzic-on, por fari tie ĉi siajn mendojn—mendojn, kies valoro ĉuijare sumiĝas je miliardoj. La vizito de la Foiro estas grandega, kaj pre-cipe post la milito ĝi kreskis neatendite, ne nur sekve de tio, ke la Leipziga Foiro nun ree estas alirebla por eksterlandanoj, sed ĉef- tial, ĉar la ekonomia utilo de tiu ĉi Foiro en vastaj rondoj de la Germanaj industriistaro kaj komercistaro estas nun atentata multe pli ol antaŭe, ĉar la grandaj perdoj en la milito kaj la premantaj pac-kondiĉoj devigas plene eluzi ĉiujn ekonomiajn aranĝojn, kiuj ŝparigas tempon kaj monon. Kaj tia aranĝo estas la Foiro, en kiu la plej granda negoco povas esti farata per la plej malgrandaj elspezoj, dum la plej mallonga tempo kaj sur la plej malvasta loko.

Cio ĉi klarigas la rapidan kreskadon de Leipziga Foiro, kiun plej bone ilustras la ĉiam altiĝanta nombro de la vizitantoj. Printempe 1902 oni notis en la Leipziga Foiro 2659 firmaojn, en la lasta antaŭ-milita Foiro (printempo 1914) la nombro jam estis 4253. Post kom-prenebla malaltiĝo en la unuaj jaroj de l' milito oni notis aŭtune 1918 5476 ekspozantojn, kiu nombro poste altiĝis salte: printempe 1919, 8325; printempe 1921: pli ol 15,000 da ekspozantoj.

Al tiu ĉi rapida kreskado de la nombro de l' ekspozantoj respondis ankaŭ la nombroj de la vizitantoj entute: aŭtune 1915 ĉirkaŭ 18,000, aŭtune 1919 pli ol 11,800, printempe 1921 pli ol 130,000.

La nombron de la ekspozantoj en Leipzig (printempe 1921: 15,000 aŭtune 1921: 13,000) la sumo de la ekspozantoj de ĉiuj aliaj German-aj Foiroj atingas eĉ ne de malproksime; ĉar la lasta aŭtuna Foiro (1921) en Frankfurt an Main havis nur 2,862, en Koenigsberg 2,050, en Breslau 1,500 ekspozantojn. Tre granda parto de l' vizitantoj de la Leipziga Foiro estas eksterlandanoj, ekz. printempe 1910: 3,198, aŭtune 1918: 6,431, kaj poste la nombro kreskis konstante kaj atingis printempe 1921 sian plej altan ĝis nun punkton: pli ol 25,000.

La uzebla loko por la ekspozejoj de la Leipziga Foiro sumiĝas je ĉirkaŭ 250,000 kvadratmetroj, kiun areon aliaj Foiroj eĉ ne de mal-proksime atingas.

Niaj samideanoj havos certe apartan intereson por la fakteto, ke la Leipziga Foiro propagandas ankaŭ Esperanto kaj fondis apartan Esperanto-Fakon. Tiu ĉi institucio ne nur staras sur la papero, sed efektive—kaj bonege—funkcias. Tie oni povas ricevi ĉiujn informojn pri la foiro: la adreso estas:

“Esperanto-Fako Messamt, Leipzig, Markt 4.”

Estas dezirinde, ke la samideanoj multnombre uzu ĉi tiun informejon!

(Por pli longa ilustrita priskribo de tiu ĉi foiro, vidu Esperanto Triumfonta no. 62, kiu donacas pogrande por uzo ĉe komerco tiun specialan numeron.)

IMPORTANT STATE PAPERS IN ESPERANTO
GRAVAJ STATDOKUMENTOJ

La Kvar-Regna Traktato

Freŝdate proponita ĉe l' Arma Konferenco en Washington.
(The New Four-Power Treaty.)

Usono, la Brita Imperio, Francujo kaj Japanujo,
Kun la celo konservi la ĝeneralan pacon kaj subteni siajn rajtojn
rilate al siaj insulaj posedajoj kaj insulaj subregnoj en la regiono de
la Pacifika Oceano,

Decidis fari tiusence traktaton kaj difinis kiel siajn plenpovulojn
La Prezidanton de Usono,

Lian Reĝan Mōston la Reĝon de l' Unuigita Regno Granda Brit-
ujo kaj Irlando kaj de la britaj subregnoj preter la maroj, Imperiest-
ron de Hindujo,

Kaj por la Subregno Kanado,

Por la Civito Aŭstralio,

Por la Subregno Nova Zelando,

Por Hindujo,

La Prezidanton de la Franca Respubliko,

Lian Reĝan Mōston la Imperiestron de Japanujo,

Kiuj, komunikinte siajn plenajn povojn, legitimitajn, interkon-
sentis jene:

I. La mōstojoj kontraktanoj interkonsentas respekti reciproke siajn
rajtojn rilate al siaj insulaj posedajoj kaj insulaj subregnoj en la re-
giono de la Pacifika Oceano.

Se naskiĝus inter iuj el la mōstojoj kontraktanoj dispuco devenanta
de iu Pacifika demando kaj tušanta iliajn diritajn rajtojn, kiu ne kon-
tentige solviĝus per la diplomatio kaj verŝajne ĝenus la harmonian
akordon nun feliĉe ekzistantan inter ili, ili invitos la ceterajn mōstojojn
kontraktanojn al kuna konferenco, al kiu la tuta temo estos submetata
por konsiderigo kaj ĝustigo.

II. Se la diritaj rajtoj estos minacataj per atakema agado de iu
alia Ŝtatpotenco, la mōstojoj kontraktanoj komunikos inter si plene kaj
malkaše, por interdecidiĝi pri la plej efikaj rimedoj uzotaj, kune aŭ
aparte, por trafi la bezonojn de la speciala situacio.

III. Tiu ĉi interkonsento funkciadu dek jarojn depost sia ekefiko,
kaj post fino de tiu periodo ĝi daŭre funkciadu, tamen kun rajto de iu
ajn el la mōstojoj kontraktanoj ĝin fini post dekdu-monata avizo.

IV. Tiu ĉi interkonsento estu konfirmata kiel eble plej baldaŭ
laŭ la konstituciaj metodoj de la mōstojoj kontraktanoj kaj ekefiku je
depono de la konfirmoj, kiu havu lokon en Washington, kaj ĉe tio la
interkonsento inter Granda Britujo kaj Japonujo, kiu fariĝis en Lon-
don, 13 Julio, 1911, eksigu.

Tradukis H. M. S.

Alia Profitegisto.—“Dek mil frankojn por tiu malnova pentraĵo?”
Mi povus kompreni se vi postulis tiom por moderna pentraĵo, konsid-
erante la nunan prezon de oleo, sed dum la dekoka jarcento oni povis
aĉeti oleon po unu cendo la litron! —Le Pele Mele.

XIVa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
 en Helsinki (Helsingfors), la 6.—12. de Aŭgusto, 1922

EL DUA KAJ TRIA KOMUNIKOJ

Aliĝo.—En la 1a komuniko la L.K.K. promesis, ke samideanoj, kiuj jam nun aliĝas, sed pro neantaŭviditaj kaŭzoj ne povos ĉeesti la kongreson, rericevos 75% de la pagita kotizo. Post plua pripensado kaj konsiliĝo kun la K.K.K. la L.K.K. tamen trovis tian aranĝon nebla kaj per tio ĉi reprenas la promeson.

Ni volas atentigi al la kongresanoj, ke se ĉiu aliĝanto havigos al la kongresa kaso donaceton egalvaloran al sia kotizo, la financoj de la kongreso estos sur firma fundamento.

Kongresa afišo.—La L.K.K. eldonos, laŭ skizo farita de la artisto S-ro Eric Vasstrom, belan kongresan afišon en 3 koloroj, kiu estos dissendata por elpendigo en 9,000 ekzemperoj ĉirkaŭ la tuta mondo al la delegitoj de U.E.A., esp. grupoj, vojaĝoficejoj, ktp.

Ekskursoj.—Dum la kongresa semajno ekskursoj—krom en la apudajn ĉirkaŭajojn de la urbo—verŝajne ne okazos, pro la longaj distancoj.

“Voyaĝado en Finnlando.”—En komenco de la jaro estos reeldonata, en kunlaboro kun la Turista Societo de Finnlando la ilustrita gvidlibro, “Voyaĝado en Finnlando,” kiu interese priskribas la vidindajojn de nia lando. La teksto estos tute nova kaj pligrandigita, kaj la ilustraĵoj multaj kaj belaj.

Gazeta propagando.—Car estas dezirinde fari propagandon pri la XIVa ne nur en la Esperanta gazetaro sed ankaŭ en la ĉiunacia, la L.K.K. petas samideanojn en ĉiuj landoj, ke ili penu fari interkonsenton kun la gazetoj de sia urbo pri publikigo de antaŭkongresaj novajoj, kiujn la samideanoj povos fari laŭ la komunikoj, kaj de postkongresa raporto, kiun la L.K.K. verkos kaj sendos al petintoj. Ankaŭ ilustraĵojn de la kongreso kaj la kongresurbo la L.K.K. laŭpeto sendos, kondiĉe ke ili estu represataj en naciaj ilustritaj gazetoj.

Alveturo.—Car la kongreso ĉitiun fojon okazos en lando, kien ĉiuj eksterlandanoj devos veni tra la maro, la L.K.K. speciale atentos pri bona aranĝo de la alveturo de la ŝipoj. La intertraktadoj kun la Finna Vaporſipa Kompanio ankaŭ jam kondukis al principa interkonsento, laŭ kiu ni jam nun povas doni la jenajn informojn.

“Brita Imperio.”—Šipo (verŝajne “Arcturus”) eliros el Hull merkredon la 2an de aŭgusto, tra Kopenhago (4|8), kie ĝi restos nur kelkajn horojn, kaj alvenos Helsingforson dimanĉon la 6an posttagmeze. Vojagprezoj, speciale rabatitaj por la kongresanoj, estos maksimume en la Ia Klaso £ 14:8 ŝ.— IIa Klaso, 11:12—, kaj IIIa Klaso 6:14— (ĉio kun manĝo).

Danlando.—La ŝipo el Hull prenos la danajn samideanojn el Kopenhago vendredon la 4an de Aŭg. ptm. Alveno Helsingforson la 6an. Vojagprezo maksimume Ia Klaso D. Kr. 160—, IIa Klaso 120—, kaj IIIa Klaso 72— (ĉio kun manĝo).

Germanio.—El Stettin (verŝajne “Ariadne”) eliros la 2an Aŭg. alvenante Helsingforson vendredon la 4an. Vojagprezo maksimume en la Ia Klaso, Finn. Mk. 720—kaj en la IIa Klaso 640— (ĉio kun m.)

Svedlando.—El Stockholm ŝipoj iros 3foje semajne. Plej konvena ŝipo por la kongresanoj eliras jaŭdon la 3an Aŭg., alvenas Helsingforson la 4an. Vojagprezoj maksimume en Ia Klaso S. Kr. 80—, IIa Klaso (sen kajuto) 48—(cio kun m.)

Aliaj linioj. Krom tio ekzistas eblecoj ke speciala ŝipo povu veturi el Lubeck vendredon la 4an de aŭgusto Helsingforson lunden la 7an frumatene. Prezoj samaj kiel el Stettin.

Per la linio Antverpen-Rotterdam-Helsingforso ankoraŭ ne estis eble rezervi ŝipon.

La samideanoj, kiuj deziras uzi ĉi tiujn ŝipojn, devos pri tio informi al LKK aŭ al la Karavangvidantoj en la diversaj landoj plej malfrue 6 semajnojn antaŭ la ekveturo. La LKK jam interkonsentis kun S-ro P. Blaise, 125, Hambalt Road, Clapham, London, S. W. 4 pri gvidado de la brita kaj kun S-ro L. Poncet, 36, rue Victor Hugo, Lyon, pri gvidado de la franca karavano, kaj petas ĉiujn britajn kaj francajn samideanojn sin turni al ili en ĉiuj demandoj. La LKK esperas, ke ĝi baldaŭ povos sciigi nomojn de karavangvidantoj ankaŭ en aliaj landoj kaj petas personojn interesigintajn fariĝi tiaj plej baldaŭ informi pri tio al la LKK.

Koncerne la forveturon el Helsingforso post la kongreso, la LKK ankaŭ povas sciigi, ke ŝipoj al Hull kaj Stettin foriros sabaton la 12an de aŭgusto vespere, kaj al Stockholm dimanĉon la 13an matene, kiujn okazojn do povos uzi la samideanoj kies libertempo ne permesas pli longan restadon en Finnlando. La ŝipoj elveturas ĉusemajne, la nomitajn tagojn.

La Loka Kongresa Komitato.—Adreso: pošta (ankaŭ por monsendoj): XIV Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando. Telegrafo: Esperanto, Helsingfors.

TRIA KOMUNIKO

1. Vivkostoj en Helsinki. La cifero I signifas unuarangan hotelon aŭ restoracion, II duagradan, III pensionon aŭ "hejmon por vojaĝantoj" (puraj kaj komfortaj), IV malkaran manĝejon (ankaŭ ĉi tiuj tre rekomendindaj). Loĝejo: I 35—70 mk (du litoj 50—100 mk), II 30—50 mk (du litoj 40—70 mk), III 25—35 mk (du litoj 35—50 mk). Teo aŭ kafo kun buterpano 5—6 mk. Matenmanĝo (lunco) I—III 12—15 mk, IV 5—9 mk. Tagmanĝo I 20—25 mk, II 15 mk, III 12 mk, IV 6—10 mk. Vespermanĝo same kiel tagmanĝo. Vegetara matena, taga aŭ vespera manĝo 7—9 mk.—Pri malkaraj loĝejoj ni informos poste.

2. Aliĝo. La aliĝilo nun estas preta kaj sendita kun la Esperanta gazetaro en ĉ. 40,000 ekzempleroj. Se iu tiel ne ricevis la aliĝilon, bonvolu peti ĝin de la LKK.

Ni reatentigas, ke nur aliĝoj kun kotizo estas registrataj. La jam aliĝintoj estas petataj plenigi kaj alsendi la aliĝilon.

3. Pritraktotaj aferoj. Ni atentigas la samideanojn, ke ĉiuj pritraktotaj aferoj estas informotaj al la KKK, per adreso de Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris, antaŭ la 1a de majo 1922.

4. Fakaj kunsidoj. La LKK konsideras la sukceson de la fakaj kunsidoj tre esenca por la ĝenerala sukceso de la kongreso, tiel je propaganda vidpunkto kiel ankaŭ por la progresado de nia interna movado. Tial la LKK iniciatos, ke diversaj fakaj organizoj invituj aranĝu la fakajn kunsidojn. En niaj komunikoj ni informos la adresojn, al kiuj povis sin turni la samideanoj, kaj laŭeble la societojn invitantajn.

Laboristoj. Laborista Esperantista Societo "Unueco" kaj la Kleriga Ligo Laborista (Finnlanda). Adreso ĉe Tyovaen Urheiluliitto (Laborista Sportligo), Elaintarhantie 1, Helsinki.

Blinduloj. S-ro R. Bergh, Gengatan 3.

Kristanoj. Pastro H. Patiala, Vuolenkoski, Uusikyla.

5. **Antaŭkongresa ekskursio trans la Polusa Cirklo.** Ĉar kelkaj samideanoj el Italio esprimis la deziron viziti la bordojn de Glacia Oceano, ni decidis iniciati ekskurson al Petsamo, la nova teritorio de Finnlando ĉe la Glacia Oceano. Ĉi tiu vojaĝo kompreneble estas tre longa kaj parte peniga, tiel ke ni povas ĝin rekomendi nur al grandaj turistoj, sed cetere neniu ekskursio pli plene valoras la penojn. Ni aludas al la ilustrita artikolo en Esperanta Finnlando, decembro 1921. —La partoprenantoj devos elveturi el Kristiania, ĉefurbo de Norvegio, la 9an de julio; ili povos resti unu tagon en la interesaj urboj Trondhjem kaj Tromso, kaj alvenos al Vardo la 16an nokte. Ĝis tie la vojaĝo okazos en unuaklasa vaporŝipo. De tie oni daŭrigas per motorboato al Petsamo, kie ni alvenos antaŭ la malleviĝo de suno, kiu okazas la unuan fojon en la somero la 17an de julio, certe ankaŭ tiam nur por kelkaj minutoj. La meznoktan sunon la ekskursantoj vidos almenaŭ trifoje. En Petsamo ili restados ekskursante kaj fiŝkaptante 7—10 tagojn, por poste ekveturi laŭ riveroj, lagaroj, ŝošeoj, per boatoj kaj poŝta aŭtobuso ĝis Rovaniemi, kie ili eniros fervojan kupeon. La 3an de aŭgusto ili alvenos en Helsinki, kie ili do havos du plenajn tagojn por ripozo kaj rigardado de la urbo, se ili ne volas uzi tiujn al ekskursoj. —La ekskursanoj, kiuj eble ne kuraĝas alveturi tra la dezertoj, laŭ riveroj kaj lagoj, povas reveturi laŭ la linio Vardo-Narvik-Haaparanta-Tornio-Helsinki, per vaporŝipo kaj vagonaro. —La kostoj de vivado en Petsamo estas ĉ. 50 Fmk tage. La veturo tra la dezertoj kostas 1,200—1,800 Fmk (laŭ la nombro de partoprenontoj), de Petsamo ĝis Helsinki, kun manĝo, tranoktado kaj ĉio enkalkulata. La vojaĝo tra Narvik proksimume egale. Biletprezoj: fervoje Kristiania—Trondhjem I 134:— II 67:— III 39:30, ŝipe Trondhjem—Vardo I 117:50, II 75:— III 47:50 Norvegaj kronoj.

6. La poštakartoj kaj reklamsignoj promesitaj pretiĝas en mezo de decembro kaj estas sendataj al ĉiuj mendintoj. Mendu kaj uzu kiel eble plej multe!

La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj:

Germanio 10, Angllando 7, Holando 6, Estonio 4, Ĉekoslovakio kaj Franclando po 3, Aŭstrio, Pollando, kaj Svislando po 2, Finnlando 37, entute 76 aliĝintoj el 10 landoj.

KIAM NENIA STELO BRILAS

2a parto: La Rakonto de F-ino Lajoie

Cu iu pli ol mi ŝuldas al tiu ĉi lingvo? Mi dubas. En la lasta tempo ĝi estis ĉio por mi. Senokaza, sen intereso estis mia vivo, ĝis antaŭ kelkaj semajnoj; kaj kiam oni postulas ke mi rakontu pri ĝi, mi efektive povas ekrememori nenion dirindan, krom la maniero en kiu mi venis al kono de la vortoj kiujn mi nun uzas, kaj la granda servo tia kono jam faris por mi.

Mi naskiĝis antaŭ deksept jaroj en Kanada vilaĝo, kie oni parolas nur france. Ambaŭ miaj gepatroj mortis kiam mi estas tre junaj —mi preskaŭ ilin forgesas— kaj poste, monahineja lernejo akceptis min. Tie de la komenco mi havis veran amikinon en Fratino Madeleine-Celeste. Si komprenis min, kiam aliaj nomis min stranga knabino; kaj pro tio mi ŝin amis, pli ol ŝi iam povis konscii. Estis Fratino Madeleine-Celeste kiu sur sin prenis mian apartan instruadon, kiam mi ploris pro tio ke la ĝis-tiamaj instruistinoj opinias min stulta. Sed rekte de tiu momento da malfeliĉo rezultas ke mi uzas nun tiun ĉi lingvon.

Angelo-sur-tero estis Fratino Madeleine-Celeste. Sub ŝia gvidado, inspirita al penoj pro dankemo kaj amo, mi efektive komencis brili je kelkaj el la lernaj objektoj; kvankam antaŭe, mi tutajn paĝojn de lernolibro ruinigis per larmoj, anstataŭ ilin studi, pro la konvinko ke mi ne kapablas. Ĉe lingvoj, tamen, mi malmulte pliboniĝis; kaj Fratino Madeleine-Celeste kun vera saĝo ĉesigis la lecionojn latinan kaj anglan, en kiuj lingvoj mi ja nenion komprenis, daŭrigante nur la francan gramatikon. Si diris ke nenio bona rezultas el studio kiu ne estas agrabla al lernanto.

